Literatura Mondo

Ĵus aperis la Dua volumo de represo el Japanio Prezo 50,- GM + afranko

**PILO-PRESS**

Internacia Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 8/1975 - 2 mar 75
Aperas ĉiusemajne

## Jubilea Jaro de la Belartaj Konkursoj

Lansdowne, Pa. USA (pp/uea) En letero de la 25 februaro 1975 al prof. Gaston Waringhien, s-ino Emilija Lapenna, s-ro William Auld, s-ro J.H. Rosbach, s-ro Roger Bernard, d-rino Clelia Conterno Gulielminetti, s-ro Ivo Rotkvić, s-ro Alec Venture kaj al s-ro Baldur Ragnarsson, s-ro Vilmos Benczik, s-ro Edwin de Kock, s-ro Miyamoto Masao, d-ro Carlo Minnaja, doktoro Pierre Ullman, s-ino Eli Urbanová, s-ro Torben Kehlet

d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo komunikas jenan rezolucion lastatempe unuanime akceptitan de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio:

La Estraro de UEA

1. notas la gravan rolon de la Esperanto-kulturo en la moderna Esperanto-movado, kaj la specialan kontribuon kiun faris tra 25 jaroj la Belartaj Konkursoj de UEA;

2. esprimas siajn dankojn pro ilia sindona laboro al la retiriĝintaj prezidanto de la juĝkomisiono, profesoro Gaston Waringhien, kaj sekretariino de la Konkursoj, s-ino Emilija Lapenna, kiel ankaŭ al la tuta juĝkomisiono de la ĵuspasinta periodo (W. Auld, R. Bernard, C. Conterno, J.H. Rosbach, I. Rotkvić, A. Venture);

3. bonvenigas al siaj roloj la novajn prezidanton de la juĝkomisiono, s-ro Baldur Ragnarsson, sekretarion, s-ro Alec Venture, kaj juĝkomisionon;

4. kaj deklaras 1975 Jubilea Jaro de la Belartaj Konkursoj - evento festota dum la 60-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, 26 julio - 2 aŭgusto 1975.

*****************

## 16a internacia skisemajno de esperantistaj fervojistoj

Plan, Dolomitoj (pp) La 16a internacia skisemajno de esperantistaj fervojistoj (IFES) okazis inter la 15a kaj 22a de februaro sur la Dolomitaj montoj en Plan (Val Gardena), Italio. Partoprenis pli ol 50 personoj el Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio kaj Italio. Abunda neĝo kaj belega vetero certigis bonhumoron kaj ĉiuspecajn plezurojn. La Alpa Domo de la "Postlabora Fervojista Unuiĝo Itala" estis je duono disponigita al ni esperantistoj, la alian duonon plenigis italaj fervojistoj kun familianoj: favora por la varbefiko, malfavora por la realigo de vesperaj programoj pro la temperamentplena bruo.... Multaj arĝentaj pokaloj estis disdonitaj inter la gajnintoj de la skikonkuro; la kombinitan premion de IFEF por Lingva Konkuro kaj Skiado gajnis Josef Weidacher el Munkeno. Sinceran dankon meritas la sindonaj organizintoj, familio Gimelli el Bologna.

Gernot Ritterspach

+++++++++++++++

Oberkirch atendas vin! Aliĝu al la Germana Esperanto-Kongreso 1975!

## I L E I al UNESKO

Hannover (pp) Helmut Sonnabend, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en letero de la 22 februaro 1975 al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO en Parizo skribis i.a. jenon:

Pere de mia ĝenerala sekretario, prof. d-ro Dazzini, mi estis informita pri via interesiĝo regule kunlabori kun nia Internacia Ligo. Mi tre prisalutas vian deziron kaj laŭ niaj eblecoj kaj fortoj volonte subtenas vin en via eminenta kaj grava laboro........

De la 29.4. ĝis 2.5.1975 la estraro de ILEI konferencos en Parizo. Certe eblos, ke ni povos esti akceptata de vi por persone interkonatiĝi kaj iom pli detale tuŝi konkretajn punktojn de nia dezirata kunlaboro. S-ro Fairbank, nia reprezentanto, volonte peros la tempon inter ni.

Por pli vaste enkonduki Esperanton kiel lernejan studobjekton ni klopodas ĉie en la mondo aranĝi lernejajn eksperimentojn. Atentindan pedagogian eksperimenton ni finis inter kvin ŝtatoj en nia regiono I (Italio, Hungario, Bulgario, Jugoslavio kaj Aŭstrio). Prof. d-ro Szerdahely, Universitato de Budapest, ĉi-jare eldonos la finajn dokumentojn.

Ni nun organizas Esperanto-eksperimenton en la elementa lernejo, t.e. triaj kaj kvaraj klasoj. Partoprenos klasoj en Francio, Belgio, Britio kaj Aŭstrio kaj F R Germanio.

La modela eksperimento estas limigita je du jaroj, ĝi komenciĝos la novan lernojaron 1975. La celoj estas jenaj:

1. Dokumenti la pli bonan lernefektivecon kaj ekonomion ol ĉe la studado de aliaj fremdaj lingvoj,
2. Dokumenti pli intensan lernadon de la gepatra lingvo,
3. Dokumenti pli bonan stiradon de la leg- kaj ortografia proceso ĉe lernmalfortaj infanoj,
4. Dokumenti pli bonajn lernŝancojn ĉe pliaj fremdlingvoj (sekvo de la eksperimento) kaj
5. Dokumenti integriĝintan eŭropan konscion ĉe eksperimentaj personoj, -gvidantoj kaj -akompanantoj.

La eksperimenta materialo por la unua jaro konsistas el 289 vortoj, 66 gramemoj, 21 gramatikaĵoj kaj 34 frazaj strukturoj. Entute devas esti atingitaj 134 lerneeloj. Antaŭvidite estas 70 studhoroj por unu jaro. Post ĉiu kvina leciono estos testoj kontrolotaj en la komputera centro de la universitato Paderborn. Kompetenta internacia konsilantaro observos la eksperimenton kaj verkos ekspertizon.

UNESKO povus multe helpi al niaj klopodoj komprenigi niajn intencojn al politikaj medioj, kiam ĝi nur idee kaj morale subtenus nin.

ILEI pro tio petas UNESKON doni al niaj eksperimentoj ĝian aŭspicion.

************************

## Ekspozicio pri lingvaj minoritatoj

Stolberg (pp) El artikoloj en la loka gazeto "Stolberger Nachrichten", (kun foto) ni eksciis, ke de la 16.2. ĝis 16.3.75 okazas ekspozicio pri lingvaj minoritatoj en Eŭropo en la popol-altlernejo de Stolberg, kunmetita de U.J. Moritz. Tiu ekspozicio jam estis montrita pasintjare en Eschweiler. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ lokaj eminentuloj, i.a. la urbestro de Stolberg.

## Esperanto ĉe Didacta 1975

Nürnberg (pp) De la 10 ĝis 14 marto 1975 okazas en Nürnberg la konata eŭropa foiro pri lerniloj kaj instruiloj, nomita Didacta, kies vizitantoj estas ĉefe pedagogoj kaj instruistoj el tuta Eŭropo.

Esperanto-eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, reprezentos Esperanton per aparta, propra stando. La stando troviĝas en Halo D de la nova moderna foira tereno sub la numero 4135.

La kostoj por la stando estas pli ol 1.000 GM. GEA subvenciis la kostojn per 500 GM.

Interesuloj kaj esperantistoj estas invititaj viziti la standon. Ankaŭ mondonacoj estas bonvenaj!

## 5a Kultura Semajnfino de SEL

Saarbrücken (pp/sel) Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) aranĝas dufoje ĉiujare Kulturajn Semajnfinojn, kies 4an dum oktobro 1974 kunfinancis tri politikaj instancoj de Sarlando. La 5a Kultura Semajnfino okazos je 2/4 majo 1975 en apudlaga kastelo "Junkerwald" en Blieskastel-Niederwürzbach. La programo antaŭvidas tri kursojn: A (por komencantoj), B (por progresintoj) kaj C kun prelegserio de la svisa psikistro d-ro Tazio Carlevaro pri la temo "Psikolingvistiko kaj interlingvistiko". Krome okazas katolika diservo en Esperanto, vingustumado kun klarigo de vinberkulturisto kaj komuna fromaĝofonduso. Interesiĝantoj turnu sin al SEL, Parkweg 14, D-6601 Scheidt.

## Kopenhago kaj Vieno

Vieno (pp/WM) Rigarde al la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago okazis en la kadro de la Semajno de Internacia Amikeco komuna solenaĵo de Societo por internaciaj kontaktoj - Esperanto-amikoj kaj Aŭstria Esperantista Federacia kun la dana Komunumo "Det Danske Samfund i Østrig" en la salonegoj de "Loyalty-Club" Wien vendrede la 21 februaro.

## Esperanto en la radio (pp)

Varsovio. La 30a datreveno de la liberiĝo de Pollando plu forte sentiĝas en la elsendoj el Varsovio. La 9a de majo estas deklarita nacia festotago de Pollando.

El la dimanĉa Esperanto-ekspreso ni eksciis, ke Andrzej Pettyn fariĝis estro de la finn-lingva redakcio kaj Mariusz Dastych avancis al la estro de la danlingva redakcio. Pilo-Press kore gratulas! Tamen ambaŭ ankaŭ estonte laboras por la Esperanto-redakcio, kiel oni povas konstati el la ĉiutagaj elsendoj. La E-redakcio havas novan redakcian sekretariinon, kies nomon ni bedaŭrinde ne povas citi.

Ni atentigas pri la aktuala konkurso de Pola Radio, kies tekston ni publikigas en anonco sur la lasta paĝo.

Vieno - Romo. Bedaŭrinde la aŭdebleco de tiuj du stacioj ne jam estas bonaj. Momente Vieno estas pli bone aŭdebla en la matena elsendo.

## Krizo nun ankaŭ en Aŭstrio?

El la semajna komentario de Werner Schmidt de la 22/23 feb 75 (Vieno) ni citas jenon:

"Ankoraŭen aŭtuno multaj observantoj admiris la elanon de la kontraŭ-inflacia politiko en nia najbarlando, la F R Germanio. Kelkdekmil senlaboruloj ne ŝajnis al ili ofero tro granda. Nun ili ŝokite miregas pri la gigante tie kreskanta senlaboreco. En Aŭstrio, kontraste, kies registaro praktikis alian, ore mezvojan ekonomipolitikon, la inflacio neniam superis dek procentojn. Sed ĉu .....la ĝenerala krizo........trafis nun ankaŭ nian landon?"

## KONKURSO DE POLA RADIO

En la 1975 j. pasos la 30 datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno ni petas pri respondo al jena demando:

Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30 datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Box 46, Pollando,

en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 9 de majo 1975 j. - decidas la dato de la poŝta stampo -.

La rezultojn de la lotado ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15 de junio 1975 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo fiksota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO
Warszawa